

Deklaracio de Parizo **de IHEU**

*Tiu chi deklaro estis unuanime akceptita fare de 300 partoprenantoj en la 16a internacia kongreso de la **Internaciista Humanista kaj Laika Unuigo (IHEU)** dum sia plenkunsido de la 7a de julio 2005. Tiu kongreso arigis partoprenantojn el pli ol 50 landoj venintaj el la kvin kontinentoj. Ghin organizis la **Nacia Federacio de la franca Libera Penso**.*

*Ghi okazis che **Unesko** kaj che la **universitato de la Sorbono**. Ghi estis organizita kune kun la **franca Komisiono de Unesko kaj oficiale salutata fare de la direkto de Unesko**. La respondeculoj de **IHEU** estis oficiale akceptataj che la **kvestorejo de la Nacia Asembleo** fare de **s-ro Jean Le Garrec**, deputito de la franca Respubliko, liberpensulo.*

* * *

La 16a kongreso okazis en Parizo de la 5a ghis la 7a de julio 2005 por memorfesti la centan datrevenon de la franca legho de disigo de la Eklezioj kaj de la Shtato de la 9a de decembro 1905. Apogante sin sur la heredajho de la nordamerika Revolucio, sur la unua amendo de la konstitucio de Usono (1791) kaj sur la meksika Revolucio, tiu franca legho markis la komencighon de laikigo iniciatita de la Lumoj kaj de la franca Revolucio por lokigi la Homon je la koro de sia destino.

Chie en la mondo, sur chiuj kontinentoj, jam de jarcentoj, la humanistoj agis kaj daure agas por la triumfo de la libereco de konscienco. Tiu chi estas fondinto de la homa emancipado kaj ne povas esti disigita de la batalo por la demokrata libereco.

« *La Homo estas la mezurilo de chio* » diris Protagoras, antau jarmiloj en la antikva Grekio, patrujo fondinta la nocion de civitaneco. En la malnova Hindio, 600 jarojn antau la nuna erao, tiu humanista principo estis jam asertita fare de la malnovaj Karvako (resume) : « *La moralo estas fenomeno de la naturo. Ghi estas socia konvencio, oportunajho kaj ne dia ordono. Estas neniel necese regi instinktojn kaj emociojn. Tio estas la ordonoj de la naturo. La celo de la vivo estas vivi, kaj la felicho restas la sola sagho* ».

La Homo, tio estas unue ghia konscienco kaj ghia libereco ghin uzi lau propra elekto. Neniu devigo politika, kultura, religia, ekonomia, shtata havas rajtan bazon por malpermesi au limigi la konsciencliberecon de la homaj estajhoj.

Ne povas esti libereco de konscienco tie, kie la religioj superregas la sociojn per siaj spuroj. La laikeco, t.e. la postulo de egalrajteco por tiuj, kiuj apartenas al religio same kiel por tiuj kiuj apartenas al neniu. La humanistoj chiam subtenis la agadojn celantaj konstrui la laikecon de la socioj kaj de la institucioj per postulo de tiu principo de egaleco por la kredantoj kaj la nekredantoj.

Por IHEU, kaj ghiaj membraj organizajhoj, Shtato devas esti laika, t.e. nek religia nek ateista. Peti ke estu vera demokrata egaleco agnoskata per la legho inter la kredantoj kaj la humanistoj neniel signifas ke la asocioj alighantaj al IHEU metu chiujn vidpunktojn sur sama filozofia nivelo. Ni havas neniun devon je respekto rilate al la asertoj absurdaj kaj reakciaj, kia ajn estas ilia malnoveco ; la vera humanismo estas la plenumo de la libereco de konscienco per la metodo de la libera ekzameno.

La konkerado de la samaj rajtoj por chiuj estas pozitiva pasho en direkto de la laikigo, kaj disigo de la religioj kaj de la Shtato estas rimedo necesa por tio. La laikaj garantioj ne devas do esti nur lauleghaj, sed ankaŭ konstituciaj — sen tiu institucia dispozicio, kiel garantii la liberecon de konscienco por chiuj ? Legho sen konstitucia garantio povas esti anstataŭigata per simpla shanghigho de plimulto. Tial la institucia disigo de la religioj kaj de la Shtatoj chie en la mondo estas postulo de IHEU. Tio estas la lumo, kiu lumigas la vojon de la popoloj kaj de la nacioj. La historio de chiu popolo, de chiu nacio, estas nature malsimila. Estas landoj, tiel Usono, kie la Shtato estas laika, sed ne la socio. En Francio, per la legho de 1905, la Shtato kaj la publika Lernejo estas laikaj, kaj la civitanoj havas veran liberecon de konscienco. Estas tiom da historioj malsimilaj kiom estas da apartaj landoj.

Por IHEU, chiu vojo uzita de apartaj popoloj kaj nacioj devas ghiskonduki al la disigo de la religioj kaj de la Shtatoj. Chiu laika akiritajho devas esti antaŭgardita, defendita kaj plivastigita tiucele. Tial la 16a tutmonda Kongreso de Parizo de IHEU decidis fari el la disigo de la religioj kaj de la Shtatoj unu el siaj internaciaj aktoj de agado. La 16a tutmonda Kongreso de IHEU okazis en Parizo de la 5a ghis la 7a de julio 2005 en la ejoj de Unesko kaj de la universitato de la Sorbono – du historiaj lokoj atestantaj pri la batalo por la venigo de klera humanismo, liberiganto de la mondo — engaghas sin batali por la autentika disigo de la religio kaj de la Shtato chie en la mondo.

* * *

<p>Por chiu kontakto : Christian Eyschen, reprezentanto de IHEU che Unesko. Tel : 06 07 05 46 44. Fasilto : 01 45 06 66 23. Retposhto : »<i>christian.eyschen@wanadoo.fr</i>»</p>
--